

# La NASKa fiasko

---

Verkita de Hanso BECKLIN, Markuso GRIEP, kaj Katalin KOVÁTS

Moto: *Fianĉiĝo ne estas edziĝo.* -L.L. Zamenhof

## Rolantoj

- Katalin — Ŝila
- Korvano — Markuso
- Policano — Brajeno
- Pastro — Hanso
- Juĝisto — Samuelo
- Aliulino — Tiffany
- Duoino — Ŝamanjo
- Triino — Rachel
- Kvarino — Anika
- Kromrolantoj (studentoj/NASK-ĉeestantoj)
  - Jack

Reĝisoro — Markuso

## Sceno unu

*Katalin, Korvano, studentoj, policanoj*

En klasĉambro sidas multaj studentoj, inkluzive **Korvanon**. **Katalin** staras apud la blanka tabulo, instruante la studentojn pri la akuzativo.

**Katalin:** Vi devas atenti pri la akuzativo. Ĝi estas la plej grava afero en Esperantujo. Ĉu vi scias, ke ni hungaroj havas la akuzativon? Se eĉ ni havas ĝin, ĝi devas esti tre grava, ĉu ne? Nun montru al mi vian hejmtaskon.

**Katalin** paŝas ĉirkaŭ la studentoj. La **studentoj** kaj **Korvano** montras sian hejmtaskon, sed en sia hejmtasko Korvano malbone uzas la akuzativon.

**Katalin:** Se vi ne pli bone uzos, Korvano, ni devos sendi vin al la lingva prizono. Ĉu vi ne sciis, ke en Esperantujo ekzistas lingva prizono? Kiam oni malsaĝe parolas, iomete deliktas kontraŭ nia *Fundamento*, oni devas malŝpari tempon en la prizono pro la atenco kontraŭ niaj sanktaj tekstoj.

**Korvano:** Sed... sed... mi ne volas iri al la lingva prizono! Mi timas ĝi! Ĝi timigas mi! Ne trenu mi tie, ĉar mi ne volos esti tie eĉ du horoj, ĉu mardo, ĉu vendredo!

**Katalin:** La verdikto jam estas super via kapo. Envenu, lingvaj policistoj!

**Ĉiuj:** Forportu lin! Forportu lin!

La policanoj eniras, kaptas **Korvanon** kaj mane portas lin, por ke **Korvano** ne povu tuŝi la plankon.

## Sceno du

En la prizono, kie **Korvano** kuŝas sur la planko. Ŝildo pendas; sur ĝin oni skribis "Prizono". La prizono enhavas komputilon. **Korvano** stariĝas.

**Korvano:** Ho, mi sopiras ĉeesti NASK-on anstataŭ esti ĉi tie. Miaj amikoj mankas al mi. Ho, komputilo! Eble mi povas trovi amikon per la programo *Ekparolu!* Sed mi devas kaŝi mian identecon; ĉiu Esperantisto jam scias, ke mi estis kondamnita al ĉi tiu ĉelo en la lingva prizono! Ho... mi havas ideon!

**Korvano** ŝaltas la komputilon, kaj tuj la unua onklino, **Aliulino** aperas.

**Korvano:** Saluton!

**Aliulino:** Saluton! Mi estas Aliulino, kiu estas vi?

**Korvano:** Mi nomiĝas Liĉjo.

**Aliulino:** Ĉu vi estas la fama persono de NASK kiu havas la didon? Ĉu vi ankoraŭ havas ĝin?

**Korvano:** Jes!

**Korvano** montras anason al la kamerao.

**Aliulino:** Saluton, dido! Kiel vi?

**Korvano** [parolante kiel anaso]: Mi fartas bone, ĉar mi ŝtelis ananason.

**Aliulino:** Ho, tiom sagaca vi estas! Mi planis ĉeesti NASK ĉi-jare, sed ĝi jam komenciĝis! Kion mi faru?

[al si mem]: Eble, se mi svatiĝos al li, li invitos min kaj eĉ pagos!

[laŭte]: Mi havas nur unu demandon por vi: Ĉu vi volas edzinigi min? Mi atendis la tutan vivon por iu tiel bona, kiel vi.

**Korvano:** Jes, nepre! Ankaŭ mi atendis la tutan vivon iun kvazaŭ vi! Venu tuj al NASK, kaj ni havos belan nupton.

---

Tempo pasis.

**Korvano:** Jen nur la dua horo, kaj mi jam sentas min sola. Ho, komputilo, ĉu vi povas helpi min trovi alian amikon?

**Korvano** ŝaltas la komputilon, kaj la dua onklino, **Duoino**, ekaperas.

**Korvano:** Saluton!

**Duoino:** Saluton! Mi estas Duoino, kiu estas vi?

**Korvano:** Mia nomo estas Tomaso Alexander! Ĉu vi vidis miajn Jutubajn filmetojn?

**Duoino:** Mi ne certas. Ĉu via kaŝnomo estas Evildea? Se jes, mi preĝas al vi ĉiutage.

**Korvano** deprenas la ŝuojn kaj komencas marŝi sur la scenejo.

**Duoino:** Ho, nun mi memoras! Vi estas la senŝuulo. En ordo. Mi supozas, ke vi havas tre purajn piedojn. Ĉu vi volas, ke ni geedziĝu? Mi estas pli ol iom piedema.

**Korvano** [*flustras al si mem*]: Nu, mi jam havas alian fianĉinon... sed ĉi tiu ŝajnas al mi multe pli bona Esperantisto!

[*laŭte*]: Do, kial ne! Ni geedziĝu! Venu al Raleigh, Norda Karolino; vi trovos la verdulojn tuj.

---

Tempo pasas plu.

**Korvano:** Jam pasis tri horoj, kaj neniuj vizitis min. Mi sentas min eĉ pli sola. Mi devas paroli kun iu.

**Korvano** ŝaltas la komputilon, kaj la tria onklino, **Triino**, ekaperas.

**Korvano:** Saluton!

**Triino:** Saluton! Mi estas Triino, kiu estas vi?

**Korvano:** Mi nomiĝas José Antonio, la plej bela korespondanto de la Akademio de Esperanto.

**Triino:** Ho, mi ne ofte renkontas tiom moŝtan Esperantiston. Ĉu vi scias pri la historio de la Akademio?

**Korvano:** Certe, ĉio komenciĝis kun la naskiĝo de Zamenhof en 1859. Poste, ni metu ĉion en la piednotojn.

**Triino:** Ho, jes. Ni ĵetu la formalajojn foren. Mi ĉiam sopris al akademiano, sed vi konvenas. Mi volas fariĝi via edzino. Ĉu okej?

**Korvano** [*al si mem*]: Kial ne? Mi jam havas preskaŭ Aleksecan haremon!

[*laŭte*]: Venu al la orienta marbordo de Usono, kaj vi trovos min tuj.

---

Tempo pasas plu.

**Korvano:** Aĥ, kvar horojn mi jam atendis! Eble Zamenhof povas helpi min: "Pasis la tempo, la saĝ' al ni venis." Ho, jen la tempo por alia voko per *Ekparolu!*.

**Korvano** ŝaltas la komputilon, kaj la kvara onklino, **Kvarino**, aperas.

**Korvano:** Saluton!

**Kvarino:** Saluton! Mi estas Kvarino, kiu estas vi?

Rimarkinte la ŝildon, **Korvano** stariĝas, paŝas al la ŝildo kaj turnas ĝin, kiu nun legiĝas kiel "Malliberejo". Li revenas al la komputilo, kaj deprenas "La bona lingvo" de sur sia breto.

**Korvano:** Mi estas Renato Corsetti! Kie vi loĝas, Kvarino?

**Kvarino:** Mi loĝas en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof. Tiom prestiĝa, ĉu ne? De kie vi venas?

**Korvano:** Ho, estas malfacile respondi al tiu demando. Mi devenas el Itallando, loĝas en Britio, kaj nun estas en Usonujo.

**Kvarino:** Ĉu vi deziras, ke mi edzigu vin?

**Korvano:** Kun plezuro! La verda pastro kaj ĉiuj el miaj amikoj nuntempe ĉeestas NASK-on! Venu, venu tuj!

## Sceno tri

*Korvano, Juĝisto, policanoj*

En malliberejo. **Korvano** vekigās. La **Juĝisto** eniras kun ekzemplero de *PMEG* kaj prezentas ĝin al Korvano.

**Juĝisto:** Se vi volas esti libera, vi devas ĵuri sur la *PMEG*-o.

La **Juĝisto** donas la libron al Korvano, kaj **Korvano** prenas ĝin, metas ĝin sur la plankon, kaj paŝas sur ĝin.

**Juĝisto:** Ne, ne tiel! Ĵuru *je* la *PMEG*-o!

**Korvano** komencas paŝi de sur la *PMEG*-o, sed la **Juĝisto** haltas lin.

**Juĝisto:** Ho, restu tie. Kaj bonvolu levi la mallivan manon. Ripetu tion, kion mi diros.

La **Juĝisto** kaj **Korvano** parolas unu post la alia. Kiam la juĝisto malĝuste forgesas la akuzativon, **Korvano** levas la piedon; kiam la juĝisto malĝuste usas la akuzativon, **Korvano** ĉiufoje silente stamfas.

**Juĝisto:** Mi ĵuras, ke mi lernos malpigre, kaj ke mi ĉiam malmave parolos kaj uzos nur oldalogismojn, ke mi ĝuste uzos la akuzativo\_ ĉie, kie ĝi taŭgas kaj en neniun alian lokon.

**Juĝisto:** Libere iru, sinjoro. Vi jam sufiĉe multe ŝimis ĉi tie.

## Sceno kvar

*Onkloroj, pastro, Korvano, NASK-ĉeestantoj*

Ĉe NASK, la kvar virinoj, **Aliulino**, **Duoino**, **Triino**, kaj **Kvarino**, eniras unu post la alia, kurante al sia fianĉo. Ili tuj rimarkas, ke estas aliaj virinoj ĉirkaŭ si! Poste, la **Pastro** eniras.

**Pastro:** Mi ne rajtas geedzigi pli ol unu paron! Vi devas elekti nur unu inter ili!

**Korvano:** Ho, mi ne povas elekti inter ili! Mi amas ĉiujn, sed per malsamaj personecoj!

**Pastro:** Se inter ili vi ne povas elekti... hmm... mi havas inter-nan ideon!

## Sceno kvin

*Onkloroj, Pastro, Helpanto, Korvano, NASK-ĉeestantoj*

**Pastro:** Mi scias kiel oni devas trakti ĉi tion! Por decidi pri ŝi, kiun vi edzigos, ni ludos RSKO. La venkinto rajtos edzigi Korvanon.

La **Pastro** turnas sian grandan papertabulon, sur kiu estas skribitaj la RSKO-demandoj.

**Pastro (daŭrigante):** Kiu estas la plej seksualoga prezidanto en la historio de UEA?

- Ivo la pena
- Hector Jodler'

- Renego Corsetti
- Mark Vetis

Kio estas Esperantujo?

- Oldularo
- Komunumo de stranguloj
- Kulturita rafinitaro
- Venkanta militistaro

Laŭ deklaro dum la Kongreso de Kojono, kiu estas la oficiala himno de Esperantujo?

- Dek Bovinoj
- La Espero
- La Internaciano
- La Fantoma Lum'

Kiel nomiĝas la valuto de UEA?

- La Ŝtelo
- La Melo
- La Stelo
- La Forpelo

Kion signifas la vorto "papo" en Esperanto?

- na *Pontifex maximus*
- Pajtriĉon
- Terpomono
- Puncan floron memorigan pri la Unua Mondmilito

[okaze de bezono, la **Pastro** uzas ĉi tiun demandon por decidi la gajninton]: Kio ne veras pri Katalin Kováts?

- Jam edziniĝis tri fojojn.
- Foje ŝi forgesas la akuzativo. [**Ĉiuj**: *stamfu*]
- Ŝi estis arestita pro ŝtelado de aŭto.
- Ŝi instruis Ido kaj Volapukon en universitato.

Iu venkas la aliajn, kaj la perdintoj foriras.

La **Pastro** geedzigas **Korvanon** kaj la venkintan virinon.

**Pastro** [*ĉante*]: En la nomo de la Majstro, la Akademio, kaj la Fundamento. Amen.

Ĉu vi ĵuras, ke vi tenos Esperanton en via koro, ĉiam memorante la *Fundamento* sed neniam tuŝante ĝin?

**Fianĉoj**: Ni ĵuras.

**Pastro**: Ĉu vi ĵuras, ke vi ĉiujare membriĝos en la Universala Esperanto-Asocio sendepende de la utileco, kiun vi ricevas de la membreco?

**Fianĉoj**: Ni ĵuras.

**Pastro** Ĉu vi ĵuras, ke vi neniam forgesos la akuzativon, eĉ dum tre streĉa aranĝo kiel NASK?

**Fianĉoj:** Ni ĵuras.

**Pastro** Ĉu vi ĵuras, ke vi mendos amason de la tridolaraj libroj, kiujn nun vendas Esperanto-USA, sed neniam legos ilin?

**Fianĉoj:** Ni ĵuras.

**Pastro:** Kaj, ĉu ni ĉiuj ĵuras, ke ni ĉiuj ĉiujare venos al NASK, sendepende de la loko kaj ĉu hungaro instruas ĉi tie aŭ ne?

**Ĉiuj:** Ni ĵuras.

**Pastro:** Per la ekscelenceco, kiun mi havas pro la litotuko kiun mi mem volvis ĉirkaŭ min antaŭ kelkaj minutoj, mi deklaras vin geedzoj. Nun, fiksas la geedzan stelinsignon al la ĉemizo de via porĉiama amato.

La novgeedzoj, **Korvano** kaj la venkinto, fiksas la stelinsignon al sia amato.

**Korvano:** Ho, mi sentas min tiom bona, ke mi preskaŭ svenas! Eble mi eĉ falos! Kion mi faru? Ĉu iu havas pecon de kuko, kiun mi povas manĝi? Tuj venigu ĝin. Hodiaŭ estas mia nuptofesto!

**Katalin** kunportas du pecojn da kuko al la novgeedzoj, kaj ĉiuj aplaŭdas. La tuta rolantaro venas al la scenejo por riverenci kune antaŭ la aplaŭdantoj.